



Pos-Amiko

Vintro, numero 35

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. Anonima denuncinto plu denuncos

2. Oficejo de Pos-Amiko kolapsas

2. Trinkejaj mendoj fine alvenas

2. Interreto elĉerpiĝos

2. Reta karavano survoje perdita

3. Kara Koko

3. NEJ-Novaĵoj

3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Anonima denuncinto faros pliajn denuncojn

Pasintjare anonimulo denunciis TEJO-n ĉe Eŭropa Unio pro tio, ke ĝi misrepresentus sian membrokvanton. La plendo ne kaŭzis praktikajn rezultojn ekster la komentejo de Libera Folio, sed tio ne signifas, ke tiu denuncinto nun rezignos pri denuncado. El konfidencite akiritaj dokumentoj evidentiĝas, ke la sama persono planas fari diversajn aliajn denuncojn pro misrepresento:

- UEA fakte ne estas universala, ĉar ĝi havas membrojn kaj aktivitas nur sur unu planedo
- La Esperanto Civito fakte ne estas subjekto de internacia juro, sed subjekto de internacia humuro
- La Bona Renkontiĝo fakte ne estas renkontiĝo, sed podkasto
- Evildea fakte ne estas dio, nur stranga jutubisto
- Kaj Eterne Rime fakte ne estas Reĝo de la strat' (eĉ ne ekzistas tia reĝlando!)

La fraŭdoficejo de la Eŭropa Unio sendube jam antaŭĝojas ricevi ĉiujn el la denuncojn.

D-ro B. Telo serĉas laboron

Mondfama esploristo pri ligoj inter alkoholoj kaj sociaj aktivaĵoj serĉas novan laborpostenon por esplorado aŭ instruado post fermiĝo de la Akademio Internacia de la Sciencoj.

Oficejo de Pos-Amiko kolapsas

Unu el la redakciaj oficejoj, en kiuj kreiĝas la Pos-Amiko, pasintsemajne kolapsis pro tro granda kolektita pezo sur la planko. Tiu pezo ĉefe konsistis el papero por presi venontajn Pos-Amikojn. Pro la manko de surlokaj renkontiĝoj la Pos-Amiko multe malpli presiĝis en 2020, kaj rezulte la papero neuzita amasiĝis kaj finfine kaŭzis la katastrofon.

Trinkejaj mendoj finfine alvenas

Pro la pandemio sendado de poŝtaj pakaĵoj estas pli populara ol iam ajn antaŭe, sed tial ankaŭ ekestis ŝtopiĝoj en distribucentroj kaj grandaj malfruiĝoj. Tion spertis ankaŭ klientoj de la trinkejo de la IJK.

Normale menditaj trinkaĵoj alvenas post kelkaj minutoj, sed tiom rapida liverado ne eblis pro la reta kongresejo. Diversaj trinkaĵoj finfine alvenis al siaj soifaj mendintjo antaŭ la decembraj festotagoj, kaj kelkaj aliaj ankoraŭ survojas. La trinkejestro avertas kaj pardonpetas, ke la biero eble perdis iom da saŭmo dume.

Interreto baldaŭ elĉerpiĝos

Proparolanto de la Internacia Telekomunika Unio en decembro elsendis averton, ke la stokoj da interreto en la tuta mondo estas danĝere malaltaj. Se la uzado restos alta kiel en la pasintaj monatoj, jam en januaro iuj landoj plene elĉerpos siajn haveblajn megabitojn kaj baldaŭ limigi tagajn porciojn. Same kiel aliaj krizoj tio verŝajne plej forte trafos malriĉulojn kaj la junajn generaciojn. La nura regiono, kie restos havebla interreto, estos Kalifornio, kiu estas la monda ĉefproduktanto.

Reta karavano survoje perdita

Vojaĝantoj per la reta karavano al JES havis grandajn malfacilaĵojn atingi la renkontiĝon. Unu el la uzantoj pro hasto maltrafis oblikvon, kaj tiam akcidente la grupo prenis malĝustan itineron al Niĝerio tra la malhela reto. La grupo devis atendi tagon, ĉar ili ne povis trovi vojon 404 kaj vojo 403 estis barita. Fine la karavananoj plene sen kafo revenis per vojo 418 al la ŝoseo 200 kaj fine atingis la kongresejon.

Kara koko...

“Ĉu jam estas sekure eliri mian domon? Mi kaŝiĝas en mia lito ekde marto.”

Kara homo,

Pli bone nenion risku. Ĝuste hieraŭ mi volis transiri la straton (por iri al la alia flanko), kaj rapida aŭto preskaŭ trafis min. Kaj antaŭhieraŭ florpoto falis metron antaŭ miaj piedoj.

Do restu hejme, la ekstera mondo estas tre danĝera, por kokoj kaj homoj. Elektu iun sekuran profesion kiel litotestisto aŭ redaktoro.

Poso

Skribu viajn demandojn al

kkps.klackunveno@gmail.com

NEJ-Novajoj!



NEJ havas novan retpaĝon!

Post pli ol dek jaroj NEJ tute renovigis sian retpaĝon, kun pli freŝa teksto, pli freŝaj fotoj kaj pli freŝa kodo. Vizitu la novan paĝon ĉe junularo.nl aŭ esperanto-jongeren.nl!

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ĉu vi jam havas negotraktaton kun Britujo? Ne maltrafu la modon!

Taŭro: Ne falu en enuan ritmon, ŝanĝu konspirteorion ĉiumonate.

Ĝemeloj: Atentu en januaro pri subita ukulelludado.

Kankro: Vi ne plu havas megabitojn kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Ne hontu pri via barbo, Zamenhof ankaŭ havis barbon.

Virgulino: Post kreema ateliero vi ne plu estos.

Pesilo: Ne freneziĝu en kvaranteno, kalkulu esperplene la tagojn ĝis sekva plilongigo.

Skorpio: Vi jam finis ĉiujn viajn tabloludojn, sed ĉu vi jam provis ilin blinde?

Garano: Ŝatantoj petos vian subskribon sur nomŝildo.

Sagitario: Vi ne renkontos ĉarman fremdulon nek kolegon.

Kaprikorno: Ne fidu ĉion, kion vi legas, se ĝi ne estas en la Pos-Amiko.

Akvisto: Ĉu Koko Poso jam aperas en via testamento?

Fiŝoj: Ĉu mankas al vi mono? Kial ne krei propran?

IJK kun propra plaĝo!

Ĉu ankaŭ vi ne povas atendi por finfine festi Internacian Junularan Kongreson en Nederlando? Vi tute pravas! Ĉar la Nederlanda Esperanto-Junularo, sub la sperta gvidado de Koko Poso, denove pretigas brilan kongreson en mojosa loko.



De Roerdomp, Westelbeers

En tute privata terpeco, kun abundaj frititaj manĝoj kaj privata lago vi povos sperti revan kongreson kun junuloj el la tuta mondo. Se TEJO akceptos la kandidatiĝon, inter la 20-a kaj la 27-a de aŭgusto 2022 ĉiuj interesaj homoj en la mondo kuniĝos ĉi tie en unu loko.



Ĉu vi tendumos aŭ litumos?

Kaj tio kompreneble por ĉiu pagebla. Laŭplaĉe kaj laŭbuĝete oni povas dormi en ĉambro kun propra duŝejo, en amaslitejo aŭ amasloĝejo, aŭ en propra tendo. Plene organizitaj karavanoj prenos vin de flughaveno ĝis la pordo, kaj plene organizita programo prenos vin de komencanto ĝis pluraremulo.

IJK 2022. Nederlando. Venu!